

№ 01
1969

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

**Organo Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti**





IFEA

## COMUNICATO DEL CASSIERE

Si é chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per l'anno 1969. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti di inviare le quote oppure due righe di dimissioni.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C.P.n°8/24094 intestato all'I.F.E.A., Via Donato Creti n-ro 61 I-40128 BOLOGNA. Le quote sociali per l'anno 1969 restano:

- Associazione all'I.F.E.A., all'I.F.E.F., alla F.E.I. e all'U.E.A. con abbonamento alla rivista mensile "L'Esperanto"FEI: £. 2500,- annue.
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 1000,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1968, e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1968 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non pagare, anche per il 1969 le loro quote alle suddette Associazioni. ADERITE ALL'IFEA! SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE! VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE 1969!

## GITA AD AVIGNONE (FRANCIA) IN OCCASIONE DEL 21° CONGRESSO INTERNAZIONALE DELLA I.F.E.F. DAL 17 AL 23 MAGGIO 1969.

Città sede del Congresso: AVIGNONE, la famosa città provenzale che fu sede del Papato.

Programma di massima:

- Giovedì 15 maggio 1969: partenza da Bologna ore 18, da Genova ore 1,42 del giorno successivo.
- Venerdì 16 maggio: arrivo ad Avignone ore 13,01, sistemazione in albergo, pomeriggio libero. Conferenza stampa.
- Sabato 17 maggio: visita alla città. In serata riunione della conoscenza e presentazione teatrale.
- Domenica 18 maggio: Santa Messa, solenne inaugurazione del Congresso, spettacolo pomeridiano e ballo internazionale in serata.
- Lunedì 19 maggio: lavori del Congresso articolati nelle varie Commissioni, pomeriggio escursione in autobus alla cittadina di Uzès e a Pont du Gard, famoso acquedotto romano. Serata folcloristica.
- Martedì 20 maggio: lavori del Congresso, visita tecnica ad impianti ferroviari; incontro di calcio. Banchetto. Conferenza ferroviaria e film.
- Mercoledì 21 maggio: Gita di tutto il giorno in autobus al litorale del Sud attraverso la famosa Camargue e visita alla città di Arles.
- Giovedì 22 maggio: assemblea generale. Visite diverse: ad impianti ferroviari gli interessati; altre per le signore. Serata della gioventù.
- Venerdì 23:maggio: gita di mezza giornata in autobus a Fontaine de Vaucluse e alla città di Orenge. Chiusura del Congresso.
- Sabato 24 maggio: partenza per il rientro. Arrivo a Bologna in nottata.

Vi è la possibilità di partire da Bologna venerdì 16 maggio alle ore 6,20 per arrivare ad Avignone alle ore 22,59 dello stesso giorno, oppure partire, sempre venerdì 16, con lo stesso treno indicato per giovedì 15.

Prezzi di massima:

- Quota di adesione, fino al 15.3.1969 £.5.700,-, dopo tale data £.6.500,- (la metà per i familiari e pensionati). Somma da inviarsi in anticipo nel nostro C.C.P. n° 8/24094 assieme all'"aliĝilo„.

Alloggio in albergo:

| | |
|---|---|
| Categ.A da £.3.100 a £.3.900 | Categ.B da £.2.600 a £.3.100 |
| Categ.C da £.2.000 a £.2.600 | Categ.D da £.1.500 a £.2.000 |

I prezzi si intendono per camera e per notte.

Categ.speciale E: camera, colazione e cena £.3.250,-a persona e per giorno.

Alloggio in comune nella Casa della Cultura £.550 per letto (Posti limitati)
Quota per la prenotazione dell'alloggio £.250 per letto. Banchetto £.3.300.
Pasti nei locali del Congresso, bevande e servizio compresi £.1.000 al pasto.
Escursione in autobus ad Arles e Camargue, pranzo compreso £.4.900
Escursione in autobus alla Fontaine de Vaucluse e Orange £.1.300
Escursione in autobus a Uzés e Point du Gard con visita al Museo delle ruote £. 1.000.

## NIAJ KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

### 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HELSINKI (Finnlando), 26 julio - 2 aŭgusto 1969.
Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2 Nederlando.
Karavanoj: Kvin karavanoj en preparo, inter kiuj:
Italujo: IEF, S-ro G.Grattapaglia, Via O.Vigliani, 15/10 I-10135 TORINO.
Statistiko: je 9-12-1968: 339 personoj el 31 landoj.
G.G.Pompilio - Konstanta Kongresa Sekretario

### TRILANDA RENKONTIĜO EN PRINCLANDO MONAKO

En la prestiĝa kadro de Monte Carlo, okazos la 22-ankaj 23-an de marto 1969-a la jara kongreso de la Provenca Esperanto-Federacio. La Monaka Esperanto-Grupo aranĝos samtempe trilandan renkontiĝon: franca-itala-monaka, sub aŭspicioj de la princlanda administrantaro. Informojn donas la Sekretario de la Kongreso: S-ro Jos DERKS, 8 Bd. d'Italie MONTE-CARLO.
Programo: Sabaton la 22-an de marto 1969-a: horo 11 Inaŭguro de la Provenca Kongreso de Esperanto en la Palaco de Kongresoj en Monte Carlo (avenue Ostenda). Ĉeestos lokaj aŭtoritatoj kaj delegacioj de la trilandaj Esp.
horo 12,30 Akcepto kun regalo oferita de la Monaka Esperanto-Grupo.
horo 15 Kongresaj laboroj kaj ekskursoj tra la Princlando.
horo 21 Muzika kaj folklora vespero.
Dimanĉon la 23-an de marto 1969-a: horo 10 Vizito al interesa Ekzota ĝardeno kun la Groto de Observatorio riĉa de imponaj stalaktitoj kaj stalagmitoj
Horo 11 Oficiala akcepto kun regalo oferita de la Urbestraro de Monte Carlo. Bankedo ĉe hotelo Splendid (Prezo 18 francaj frankoj).
horo 15 Vizito al Oceana Muzeo, sendube unu el la plej famaj en la Mondo. Post tiu vizito estos ebleco ĉeesti Sanktan Meson en Esperanto celebrata de Abato Oreglia.

### INTERNACIA TURISTA KONGRESO

SZEGED (Hungario) 15 25 de julio 1969.
Sciendoj: La aliĝintoj devos alveni ĝis la 14-a horo de 15-a de julio 1969.
Akceptejo: MÁV Nevelöintézet, Szeged, Április 4 utja 44-a domo.
La kotizoj enkalkulas loĝadon, manĝadon, ekskursoj, k.t.p. En privataj domoj aŭ en studenthejmo, kostas po persono de Ft.700 ĝis 920 Ft. Pagoj okazu sur la konto Fremdultrafika Oficejo, Szeged, MNB, 793460-623.
Okazos mikrobusa rondveturado, ŝipekskurso, filmprezentado, orgena koncerto, promenadoj, prelegoj en diversaj lingvoj fare de bonegaj prelegantoj. Petu informoj al Emeriko Szekely, Lenin Krt.61 SZEGED (Hungario).

### 6-a PEDAGOGA INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO

SZEGED (Hungario) 10-an - 20-an de aŭgusto 1969-a.
Ankaŭ ĉijare oni organizos en Szeged, Internacian Esperanto-Seminarion por plibonigi la konon de la partoprenantoj. La kursoj estos tri: A) por komencantoj. B) por progresantoj. C) por instruantoj.Gvidos la kursojn, eminentaj geprofesoroj, fakuloj. Partoprenkotizo: 350 Hungaraj Forintoj (Ft.). Partoprenkotizo kun loĝado kaj manĝado 1000 Ft.
Petu aliĝilojn de Internacia Esperanta Seminario, Szeged (Hungario) pf.227. La koncernan sumon oni povas pagi rekte al ĉekkonto 2097-623, Szeged, Csongràd Dep.Kom. de Hungara Esperanto-Asocio, aŭ sendigi egalvaloran sumon en alilanda valuto al Hungara Nacia Banko, kun noto: la sumo estas ĝirenda al la ĉekkonto 2097-623, Szeged, Csongràd Dep.Kom. de la H.E.A.

### 2-a RENKONTIĜO POR ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ

La BARANYA (Baranja) - Departementa Komitato de H.E.A. kaj la BARANYA Dep.

Naturamika Asocio, el kore invitas vin al la 2-a Renkontiĝo por Esperantistoj-Naturamikoj, REN, okazonta de la 14-a ĝis la 24-a de julio 1969-a en ABALIGET (Hungario). Oni organizos ekskursojn al montoj kaj arbaroj de Mecsek, al historiaj urboj Pécs kaj Szigetvàr, kulturan posttagmezon, viziton al stalagmitgrotoj, elekton de Miss Abaliget 1969.
Loĝado en unuaranga internacia kampadejo. Kotizo: ĝis la fino de januaro 1969-a (poste plialtiĝos je 10%). Loĝado kaj ekskursoj: Hungaraj Forintoj de 350 al 550. Oni povas manĝi tri foje po tage en la kampadeja restoracio je prezo de 350 forintoj.
Aliĝilojn sendas kaj akceptas Baranya-DEK de H.E.A. PÉCS 1. pf.2.

## INTERNACIA ESPERANTA RIPOZEJO EN NATANIA 1969

Esperanto Ligo Israela organizas dum la jaro 1969 INTERNACIAN ESPERANTAN RIPOZEJON en "La Verda Bordo". Por tiu celo estas elektita loko troviĝanta 26 km. norden de Tel-Aviv kaj 6 km. suden de Natania. La loko nomiĝas "La Verda Bordo". La aliro al la Verda Bordo estas simpla per aùtobusoj, kiuj senĉese cirkulas inter Natania kaj Tel-Aviv.

E.L.I. pretigas riĉan interesan programon por partoprenantoj: Prelegojn pri turismaj vidindaĵoj en Israelo kun lumbildoj, kulturo kaj historio de antikva kaj nova Israelo, komencan kaj superan kurson de Esperanto.

Eluzu tiun okazon kaj vi ĝuos ĝin kaj vivos veran amikan internacian etoson. Ĝi donos al Vi fortajn, agrablajn kaj neforgeseblajn travivaĵojn kaj plifortigos la movadon en Proksima Oriento. Por informojn turnu vin al "Peltours" 28 Achad Ha'am str. TEL AVIV. Poŝtkesto 394.

## N I   L E G I S

IL TOURING - Bulteno de Turismaj Informoj de T.C.I.(Itala Turisma Klubo)-Interesa trikolona artikolo "Esperanto o inglese?", pri la polemiko starigita en tiu revuo per leteroj de membroj de T.C.I., inter kiuj la samideanoj Prof.Bardini el Mantova, Geom.Martini el Pisa, Geom.Fornaro el Verona, kiuj subtenis esperanton kiel solvon de la problemo de komuna lingvo, almenaù en Eùropo, kaj alia kiu subtenas la anglan lingvon.

BULGARINO - Eldonas la Komitato de la Bulgaraj Virinoj, Bulvardo "Patriarĥ Evtimi" 82, SOFIA. Luksa kaj interesa ilustrita revuo verkita esperantlingve, pri la problemoj de la virinoj en Bulgario.

MINOSSE - Semajna gazeto; D.Polo 1085-I.30100 VENEZIA (Italio). Entenas kutiman artikolon "Noi in tutto il Mondo" kiun verkis ĉiusemajne nia amiko D-ro Inĝ.Domenico Pastorello (13 Fos sur Mer-Francio), kun lecionoj, kronikoj de Esperanto lingvo kaj Movado. Tiuj artikoloj ampleksas kutime kvar kolonoj de la ĵurnalo.

ESPERANTLINGVAJ PROSPEKTOJ PRI FINNLANDO - Eldonitaj okaze de la venonta 54-a Universala Kongreso en Helsinki. Nome:
- Amika Finnlando - Faktoj pri Finnlando. Bunta ampleksa prospekto kun mapo de la lando.
- Helsinki, filino de Balta Maro - Kolorigita faldfolio kun mapo de la urbo kaj fotoj.
- Turku. Finnlando - Faldfolio kun fotoj nigra-blanka kaj kolora kun mapo de la urbo kaj de ĝia situo en la lando.

ESPERANTA FALDFOLIO DE VICHY - Bunta prospekto kiu reklamas la belaĵojn de la fama restadeja kaj kuraca Franca loko. Eldonas: SYNDICAT D'INITIATIVE + Office de Turisme et Thermalisme. 19, rue du Parc. VICHY (France).

## NOVA ESTRARO DE BRITA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

La jarkunveno de Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj okazis en Londono dum semajnfino en februaro 1968-a. Sabaton posttagmeze la membroj ĝuis rondvojaĝon en la urbo, kaj vespere vizitis Glacispektaklon. Oni ĝuis la ĉeeston de grupo de Belgaj kolegoj. La oficiala kunsido okazis Dimanĉon matene. La nove elektita estraro estis: Prezidanto kaj Redaktoro S-ro Horace BARKS, Vicprezidanto kaj FISAIC reprezentanto S-ro D.WILD, Sekretariino F-ino A.STEWART, Kasisto S-ro B.RANWELL, Membroj S-inoj A.SAUNDERS

A T E N T U!

Estas aĉeteblaj ĉe nia Sekretariejo - via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA "Saluto al Gegastoj" kaj "Himno de la Sportistoj", en lingvo Esperanto kun traduko, en franca, itala, hispana, germana kaj angla lingvoj. Vortoj de Advokato Raffaele BAGNULO, muziko de majstro Ettore DESDERI. Prezo Lit.150.

Ankaŭ estas aĉetebla la "GRAMMATICA DELLA LINGUA DELL'UMANITA'" (Esperanto) de nia ŝatata Honora Membro kaj elstara pioniro de Esperanto Adv.Raffaele Bagnulo. Prezo Lit.350.

NI FUNEBRAS

En novembro forpasis D-ro Giuseppe GALUPPI, bofilo de nia kasisto S-ro Catena. Juna, dinamika kuracisto, lernis esperanton antaŭ kelkaj jaroj, kaj restis ĉiam simpatianto de nia movado. Nia Asocio esprimas siajn kondolencojn al lia konsternita familio.

La 9-an de januaro forpasis, en Romo adv. Attilio VAONA. Li estis grava ekzemplo de sindediĉo al nia Movado. Esperantista pioniro, li estis unu el la lastaj italoj kiuj ankoraŭ rememoris Zamenhof kun kiu interrilatiĝis ek de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Li estis kunfondinto kaj prezidanto de Itala Esperanto Federacio en la jaroj 1922-1923. Post la dua mondmilito li fariĝis Prezidanto de la Grupo en Torino, kie li gvidis plurajn kursojn. Ĝis nun li estis Prezidanto de Itala Instituto de Esperanto. Ni perdis kun li, viglan, spertan amikon. Al familio niajn kondolencojn.

Tuj post la naskiĝo mortis la filino de juna ano de nia Asocio, Canzio CAVALLINI. Al li kaj al lia edzino senkuraĝiĝitaj pro la bato nian sinceran bedaŭron.

INFORMADO AL DANAJ MINISTROJ

ANONCO: La tri danaj ministroj pri kulturo, instruado kaj eksterlandaj aferoj devas ricevi fortan impreson pri la uzado de esperanto. Tial ni petas elsendon de 3 ekzempleroj de ĉiuspecaj broŝuroj, klubaj informiloj, revuoj, libroj ktp. Post la transdono ĉiu kontribuinto ricevos raporton.-
Inĝeniero Ib SCHLEICHER, Ved Bellahøj 21.13.DK-2700 Kopenhago BRH.Danlando.
Prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo. REPRESO PETATA.

GRANDAJ POLAJ ESPERANTO-KONKURSOJ KUN VALORAJ PREMIOJ

Okaze de la X-jaro de la Redakcio de la Disaŭdigoj en Esperanto de la Pola Radio, ni anoncas Grandan Konkurson. La ĉefa premio estas alveno al Pollando por 12-taga restado, iro kaj reiro senpage. Jen la demandoj:

1- En la jaro 1887 estis eldonita la unua lernolibro de la internacia lingvo Esperanto. Menciu la nomon de la urbo en kiu ĝi aperis.
2- En Esperanto-traduko oni eldonis plurajn elstarajn verkojn de la pola literaturo. Menciu unu el ili.
3- En la jaro 1959 okazis en Varsovio la 44 U.K. de Esperanto. Menciu la nomon de ĝia Honora Protektinto kaj la nomon de la tiama prezidanto de UEA.

La partoprenantoj de la Konkurso kiuj trafe respondos al du el inter la tri demandoj partoprenos lotadon de premioj. La respondojn oni devas sendi al Pola Radio Varsovio, Pollando-kun la kromnoto: Konkurso de la X-jaro.
La templimo de la alsendo: 31 de januaro 1969.

TURISMA KONKURSO

Tiu ĉi konkurso estas destinita por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri nia lando, kiuj dezirus pli proksime koni ĝin. Jen la demando:
"Kiun lokon en Pollando vi dezirus ekkoni kaj kial?". La tasko de la alsendota respondon precipe ne devus superi 100 vortojn. Inter la aŭtoroj de la plej valoraj eldiroj la ĵurio de la konkurso lotumos premiojn kiel senpaga alveno per aviadilo al Pollando por 10-taga ekskurso organizota de "ORBIS".
La respondoj al la konkurso sendu ĝis la 15-a de februaro 1969-a al:
POLA - RADIO -VARSOVIO - POLLANDO. Poŝtkesto 46, kiu aranĝas la Konkurson kun la partopreno de Pola Vojaĝ-Oficejo "Orbis" kaj Pola Aer-Trafika Entrepreno "LOT".

# E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA-ESPERANTO, Casella Postale 320 I-00100 ROMA. Dissendoj en Esperanto. Jaro 1969-a. La dissendoj okazas de h.21,00 ĝis h.21,30 (M.E.T.). Ondlongoj: m.30,90=kHz 9.710, m.41,24=kHz 7.275 kaj m.50,08=kHz 5.990. Fakestro D-ro Renato CORSETTI. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi-subaj temoj
Marto 1969-a: 2194 dimanĉon la 2-an: Tra la literaturo. 2195 dimanĉon la 9-an: Novaĵoj el Italujo. 2196 dimanĉon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esp. 2197 dimanĉon la 23-an: Leterkesto. 2198 dimanĉon la 30-an:Kristana mondo. Aprilo 1969-a: 2199 dimanĉon la 6-an: La itala pentristo Ambrogio Lorenzetti. 2200 dimanĉon la 13-an: La antikvaj Romanoj dum la festotagoj. 2201 dimanĉon la 20-an: Leonardo el Vinci en Lecco kaj Valsassina. 2202 dimanĉon la 27-an: La Botanika Ĝardeno ĉe Belluno.

RADIO BUDAPEST - Redakcio de la Esperanto dissendoj, P.F. 1 Budapest 5. Ĉiuvespere de la 20,30 ĝis 20,45 h. laŭ mezeŭropa tempo, per la sekvantaj ondlongoj: m.18,8=kHz 17.890 m.25,2=kHz 11.910 m.30,5=kHz 9.833 m.42,2=kHz 7.100 m.48,1 m.75,1=kHz 3.995 m.240 =kHz 1.250.

RADIO BERNA-Elsendoj en Esperanto. Studio Suisse des Ondes Courtes, Boite Postale, CH-3000 Berne 16. Lunde kaj Merkrede je horo 13,05, ondlongoj: m.31,46=kHz 9535 kaj m.48,66=kHz 6165. Ĵaŭde kaj Sabate je la horo 22,50, ondlongoj: m.48,66=kHz 6165 kaj m.75,28=kHz 3985.

PAROLAS VARSOVIO...- Radio Varsovio disaŭdigas en la internacia lingvo Esperanto tri duonhorajn programojn ĉiutage:

6,30 h. - m.200 (1502 kc/s) m.50,04 (5995 kc/s) m.42,11 (7125 kc/s) m.31,45 (9540 kc/s) m.25,09 (11955 kc/s).
16,30 h. - m.31,50 (9525 kc/s) m.25,34 (11840 kc/s).
23,30 h. - m.41,18 (7285 kc/s) m.31,41 (9550 kc/s).

La horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo.

I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA (ITALUJO)

SEKRETARIEJO: Via Donato Creti, n-ro 61 = I-40128 - BOLOGNA (Italujo)
Telefonnumero 35.90.71. C.C.Postale (Poŝtkonto) n-ro 8/24094

------oooOooo------

J A R R A P O R T O 1 9 6 9 - a

21. Landaj estraroj kaj funkciuloj

21.2 - ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.F.", Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA (Italujo).

PREZIDANTO: Prof-ro D-ro Inĝ.Bernardino LATTANZI DI MONTERUBIAGLIO
Via Sebenico, 2 ROMA.

VICPREZIDANTO: D-ro Inĝ.Giordano AZZI, Via G.Cesare,20 I-22100 COMO.

SEKRETARIO: P.i.Germano GIMELLI, Via D.Creti, 61 I-40128 BOLOGNA.

VICSEKRETARIO: S-ro Antonio DE SALVO, Via Saturnia, 49 ROMA
Oficeja adreso: Ĝenerala Direkcio F.S. (Servizio Personale-Sezione Avanzamenti), Piazza Croce Rossa, 1 ROMA.

KASISTO: S-ro Giulio CATENA, Piazza dell'Unità, 13 I-40128 BOLOGNA.

KOMITATANO DE I.F.E.F.: P.i.Germano GIMELLI - BOLOGNA.

23. Rilatoj kun instancoj kaj aŭtoritatoj

23.1 - Kiaj estas la rilatoj al fervojaj instancoj? Bonegaj pere de D.L.F.

23.2 - Kiaj estas la rilatoj al sindikatoj? Neniaj.

23.3 - Kiaj estas la rilatoj al FISAIC? Bonegaj pere de "Dopolavoro Ferroviario" kiu elpas nin ĉiurilate. Gravan helpon D.L.F. donos okaze de la organizo de la venonta I.F.E.F.-Kongreso. La Itala Filio de FISAIC estas "Dopolavoro Ferroviario" kun kiu ni havas bonegajn kontaktojn. La centra oficejo de D.L.F. en Romo, interesiĝis por ke la ifef-kongreso kiu okazos en Italio estos listigita en la oficiala programo de FISAIC kiel Fisaic-manifestacio.

23.4 - Kiaj estas la rilatoj al aliaj fervojistaj organizaĵoj (kulturaj, artaj, libertempaj, sportaj)? Ni havas bonegajnrilatojn kun A.E.C. (Association Europeénne des Cheminots) kiu ofte publikigas niajn artikolojn en sia organo "Fereurop". La Eŭropa Vicprezidanto D-ro Inĝ. Gustavo de Rosa, la Eŭropa Ĝenerala Sekretario Kav.Angelo Morchio kaj la tuta estraro de tiu Asocio petis pli viglajn kontaktojn kaj kunlaborojn ne nur kun I.F.E.A. sed ankaŭ kun I.F.E.F. sur Eŭropa kampo. La sekretario de la Itala sekcio de A.E.C. partoprenis, kune kun diversaj membroj kaj estraranoj, al nia Jubilea Kongreso en Varna kaj alparolis esperantlingve la kongresanojn dum la inaŭgura ceremonio kaj prezentis donacojn nome de A.E.C. kaj de D.L.F.

Ankaŭ la Eŭropa Interamikiĝo de Staciestroj interrilatis kun ni por starigi kontaktojn kaj kunlaborojn jam planitajn dum ilia Internacia Kongreso okazinta pasintjare en Brugge (Belgio). La 4 - 6-an de oktobro 1968-a en Peschiera del Garda (Verona), tiu Asocio okazigis sian 4-an Internacian Kongreson de Eŭropa Federacio de Interamikiĝoj de Staciestroj. Al tiu kongreso la Eŭropa Prezidanto kaj la estraro invitis nian sekretarion kaj komitatanon S-ron Gimelli, kiu salutis la kongresanaron (pli ol 200 personoj inter kiuj multaj aŭtoritatuloj kaj kelkaj esperantistoj), kaj parolis pri nia movado. La venonta 5-a Internacia Kongreso de la Federacio de Interamikiĝoj de Staciestroj okazos en Saumur (Francio) dum aprilo 1969-a. Estus oportune tiuokaze konigi denove, al tiu Internacia Federacio, nian movadon kaj nian lingvon kiu utilos multe al ili.

23.5 - Ekzistas rilatoj al ne-fervojistaj organizaĵoj, kiaj? Jes. Bonegajn rilatojn ni havas kun Itala Esperanto Federacio "I.E.F." kaj kun Turismaj Entreprenoj en Bologna kaj Rimini. Pere de niaj klopodoj la Provinca Turisma Entrepreno en Bologna eldonas faldfolion pri la urbo en Esperanta lingvo, kaj la Restadeja Turisma Entrepreno en Rimini krom esperanta faldfolio eldonos du filmojn pri turisma propagando esperante parolataj.

25. Informado en plej vasta senco

25.2.0.- Kiom da artikoloj estas publikigitaj pro via interveno aŭ dissendo de informoj al la gazetaro? pli ol 20 (inter kiuj multaj kiuj rilatas la enkondukon de lingvo Esperanto en la horaro de F.S.).

25.2.0.1.- Kiom ofte estas publikigita la artikolo "60 Jaroj Esperanto-Fervojista Movado? Neniam, pro manko da tempo.

25.2.0.2.- Ĉu vi havas rimarkigojn rilate artikolo supredirita? Neniu.

25.2.1.- Publikigo de fakaj prelegoj resp.resumoj

25.2.1.1.- Kiom ofte estas publicita la kompleta teksto de la fakprelegoj en Varna en Esperanto-revuoj? Neniam. Fervojaj revuoj? Neniam.

25.2.1.2.- Kiel supre, sed resume? Unu el la fakprelegoj de la Kongreso de Varna estis publikigita esperantlingve en "Itala Fervojisto".

25.2.1.3.- En kiom da raportoj resp. notoj la fakprelegoj estas menciitaj?
Esperanto-revuoj? n-ro 2 (L'Esperanto kaj Itala Fervojisto)
Fervojaj revuoj? n-ro 3 (Voci della Rotaia, Fereurop, Notiziario DLF)
Aliaj? n-ro 2 (Esperanto-Cerri-Biella kaj Fermodel)

25.2.2.- Ĉu vi sendis informojn al Fervoja administracio kaj sindikatoj? Kiom? Ni sendas regule nian informan bultenon al dekoj da fervojaj aŭtoritatuloj ĉe la Ĝenerala kaj Departementaj Direkcioj.
Ĉu la administracio kaj sindikatoj ricevas regule aŭ okaze informojn? Kiamaniere ili reagas? Jes ili ricevas la informojn. Nur la Ministro kaj la Ĝenerala Direkcio reagis okaze de la interkorespondado por la enkonduko de Esperanto en la horaron. La Ministro respondis afable ankaŭ al niaj bondeziroj okaze de la lasta ŝanĝo de la Ministro mem.

25.2.3.- Ĉu okazis aparta/speciala informado en la deĵorejoj? Jes, pere de afiŝoj de D.L.F. kiu reklamas niajn kursojn kaj niajn kongresojn.

25.2.4.- Ĉu vi havas regulajn, okazajn aŭ tute ne kontaktojnkun radio kaj televido? Loka radio en Bologna anoncas niajn esperantajn manifestaciojn kiam ni sendas tiujn anoncojn per gazetara komuniko.

25.3.- Ĉu vi okazigis ekspozicioj? kiam da vizitantoj proks.? Kunlabore kun la lokaj grupoj en Verona kaj Bologna, okaze respektive de la vizito de Jugoslavia karavano kaj de la disdono de la diplomoj, ni organizis malgrandajn ekspoziciojn pri la memorigo de la datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĉeestis respektive 80 kaj 30 personoj.

25.4.- Ĉu vi uzis kromajn informadeblecojn? kiajn? Krom la afiŝoj elmontritaj en la deĵorejoj kaj stacidomoj, ni havas en la centro de multaj urboj montrofenestrojn en kiuj precipe en Bologna ni montras propagandilojn pri nia movado faka kaj ĝenerala. Unu aŭ du foje monate ni ŝanĝis la materialon en la montrofenestroj.

26. Junulara agado/aktiveco

26.1.- Kiel funkcias la kunlaboro de la junularo en kaj kun la landa estraro? Bonege.

26.2.- Ĉu okazis apartaj junularaj aranĝoj? Ne.

26.3.- Ĉu la junularo ĝuas specialajn favorojn flanke de fervoja administracio aŭ de sindikatoj? Ne

26.4.- Ĉu eksistas kontakto kun ne-esperantistaj junularaj organizoj? Kiel funkcias tiuj kontaktoj (komunaj aranĝoj, diskutoj, aŭ kiamaniere)? Niaj junuloj partoprenis en la organiza vivo de I.E.J.O. (Itala sekcio de T.E.J.O.), kaj partoprenis al diskutoj kaj renkontoj kun ne-esperantistaj junularaj organizoj en la kadro de TEJO mem. Dum 1968-a ili partoprenis al la 4-a Eŭropa Renkontiĝo de Esperanta Junularo en Montecatini Terme, kun seminario por Estroj de landaj TEJO-Sekcioj.

27. Varbado

27.1.- Kiamaniere okazis kaj rezultis la varbado de novaj membroj? Kiamaniere povus IFEF vian laboron rilate varbado subteni? Ĉu vi havs ideon kiamaniere oni povus interesigi kaj plisukcesigi la varbadon? Ni varbas novajn membrojn unue pere de kursoj kiujn ĉiujare ni organizas, due farante propagandon ĉiam, ĉie, trie sendante nian Bultenon al multaj fervojistoj kiuj simpatias por nia movado, kiujn ni opinias iĝos estontaj membroj. Ankaŭ pere de elmontro de la kolekto de Esperantaj

poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj de la IFEF-Kongresoj, dum la ĉiujaraj Naciaj Ekspozicioj de fervojistoj filatelistoj, ni klopodas diskonigi nian movadon inter la fervojistoj kaj fervojaj aŭtoritatoj.

I.F.E.F. povas helpi nin sendante pli da ekzempleroj de "La Internacia Fervojisto", por uzi ilin kiel propagandiloj.

27.3.- Ĉu vi povas eltrovi adresojn de fervojistoj, kiujn oni povus aliĝigi al I.F.E.F. kiel adoptitojn? Jes.

101. Diversaĵoj

En Venezia danke al la klopodoj de D-ro Boschin kaj S-ro Ferrero (ambaŭ fervojistoj), kun la helpo de loka "Dopolavoro Ferroviario", oni starigis Esperanto-Grupon kiu organizas Esperanto-Kurson kaj sekcion Esperantan en la Biblioteko de D.L.F. Rimarkinde en Venezia ĝis nun ne ekzistas esperantistoj.

Bologna, la 25-an de januaro 1969-a

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
KAJ KOMITATANO DE I.F.E.F.
(p.i.Germano Gimelli)